

- Kuhl P, Tsao F-M, Liu H-M, Zhang Y & de Boer B (2001). *Language / culture / mind / brain: progress at the margins between disciplines. Annals of New York Academy of Sciences*, 935, 136-174
- Kuhl P, Williams KA, Lacerda F, Stevens KN & Lindblom B (1992). *Linguistic experience alters phonetic perception in infants by 6 months of age. Science*, 255, 606-608
- Mattys SL & Jusczyk RW (2001). *Phonotactic cues for segmentation of fluent speech by infants. Cognition*, 78, 91-121
- Mehler J, Dommergues J & Frauenfelder U (1981). *The syllable's role in speech segmentation. Journal of Verbal Learning and Verbal Behavior*, 20, 298-305
- Miyawaki K, Strange W, Verbrugge R, Liebermann AM, Jenkins JJ & Fujimura O (1975). *An effect of linguistic experience: the discrimination of /r/ and /l/ by native speakers of Japanese and English. Perception and Psychophysics*, 18, 331-340
- Nagata H (2001). *Diferencoj inter lingvoj konsideritaj el la vidpunkto de perceptado de parolsonoj. La Harmonio*, n-ro 187, 4-9
- Otake T, Hatano G, Cutler A & Mehler J (1993). *Mora or syllable? Speech segmentation in Japanese. Journal of Memory and Language*, 32, 258-278
- Privat E (1929). *Historio de la lingvo Esperanto. Ferd. Hirt & Sohn, Leipzig*
- Privat E (1957). *Esprimo de sentoj en Esperanto, 3-a eldono. Den Haag: Internacia Esperanto-Instituto*
- Ramus F, Nespor K & Mehler J (1999). *Correlations of linguistic rhythm in the speech signal. Cognition*, 73, 265-292
- Saffran JR (2001). *Words in a sea of sounds: the output of infant statistical learning. Cognition*, 81, 148-169
- Saffran JR, Aslin RN & Newport EL (1996). *Statistical learning by 8-month-old infant. Science*, 274, 1926-1928
- Saffran JR, Newport EL & Aslin RN (1996). *Word segmentation: the role of distributional cues. Journal of Memory and Language*, 35, 606-621
- Sagara M, Yamamoto K, Nishimura H & Akuto H (1961). *A study on the semantic structure of Japanese language by the semantic differential method. Japanese Psychological Research*, 3, 146-156
- Sakurai T (1986). *Ekusupuresu orandago. Tokyo: Hakusuisha*
- Tokyo YMCA Nihongo ka (red. 1987). *Ekusupuresu nihongo. Tokyo: Hakusuisha*
- Wells JC (1978). *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio*

### Adreso de la aŭtoro

Prof. NAGATA Hiroshi  
 Faculty of Economics, Okayama University  
 Tsushima, Okayama 700-8530  
 JAPANIO  
 <hinagata@e.okayama-u.ac.jp>

### Priaŭtoro informo

La aŭtoro laboras pri psiĥolingvistiko, precipe pri akirado de denaskaj lingvoj, homa prilaborado de frazoj, kaj aktuala (kontraŭe al ideale-formaligita) stato de lingvoscio atingita fare de plenkreskuloj. Liaj esploroj estas publikigitaj en diversaj fakrevuoj, inkluzive de Scienca Revuo.

## Bazaj scioj pri Esperanto-Literaturo\*

### II. La dua periodo inter 1919 kaj 1939

Peter ZILVAR

#### Enkonduko

Komence iom pri la epokoj (periodoj) de Esperanto-Literaturo. Kelkfoje estas disputoj inter amantoj de literaturo kaj gramatikistoj. Kelkuloj admiras la politikajn aŭ gramatikajn avantaĝojn de Esperanto. Aliuloj argumentas, ke Esperanto (se temas pri "originala poezio") dividiĝas kvazaŭ laŭ la naturo de la evoluado (de origine planita lingvo) Esperanto, ĝis nun, ĝenerale en kvar epokojn.

La 1-an epokon (t.e. la periodo inter 1887 kaj 1919) oni povas nomi "Klasika periodo" – aŭ eĉ "Primitiva Romantismo". Sekvas la 2-a epoko aŭ periodo, la "Polurita Romantismo", inter 1919 kaj 1939. Do, la dua epoko komenciĝis tuj post la Unua Mondmilito. Post tio sekvas, inter 1945 kaj ĉ. 1975, la 3-a epoko nomata "Metafiziko". Kaj al tiu sekvas la 4-a epoko, kiu momente eble nomiĝas "Nuntempa Esperanto-Literaturo", ekde ĉ. 1975 ĝis nuntempe.

Almenaŭ *William Auld*, *Kalman Kalocsay*, *István Szerdahelyi* klasikas tiujn periodojn de Esperanto-Literaturo laŭ la supre menciitaj kvar kategorioj. Kontraŭe, *Gaston Waringhien* distingas ilin jene: 1-a periodo aŭ "Tempo de provado" 1987-1900, 2-a periodo 1900-1919, 3-a periodo 1919-1941, 4-a periodo 1945 - ?

Dum la unuaj jardekoj – precipe dum la unuaj du epokoj – la literaturo de Esperanto signife distingiĝas de la nacilingvaj literaturoj. Estis la periodoj de naskiĝo kaj disvolviĝo ja ne nur de la literaturo, sed precipe la evolukomenco de la lingvo mem kaj de ĝia movado. Ofte dum la du unuaj periodoj lingvo-movado-literaturo nedisigeble interplektiĝis. Elstaraj aktivuloj plenumis diversajn funkciojn: lingvistoj, propagandistoj, organizantoj, instruantoj, literaturistoj.

\* Dosiero por studentoj kaj observantoj okaze de "Klerigado de Eo-instruistoj kaj Eo-kursestroj je la 4-a studsesio en *Herzberg am Harz* je la 17a kaj 18a de februaro 2001, en kunlaboro kun Internacia Esperanto-Instituto *Den Haag (NL)* kaj Landa Ligo Malsupra Saksio "EMAS" (DE)

Al la "literaturo" en vasta senco apartenas ĉia formo de "skriba lingvo", kiu aperas en informiloj, gazetoj, bultenoj, revuoj, magazinoj, ĵurnaloj, broŝuroj, libroj kaj hodiaŭ eĉ pli kaj pli sur kompaktdiskoj kaj en la interreto. La tipa Esperanto-kulturo elkristaliĝis pli aŭ malpli laŭ stereotipaj evoluprocedoj: iuj homoj lernis aŭ eĉ pli aŭ malpli ellernis la lingvon, fondis grupon, eldonis informilojn aŭ eĉ oficialan presorganon, fondiĝis novaj grupoj en aliaj lokoj, poste kune ili fondis landan ligan, fakan organizon, ktp.

La diversspecaj presorganoj (skriba lingvo) ludis gravajn rolojn. La libroformaj verkoj ofte konfrontiĝis kun grandaj malfacilaĵoj. Tamen ekzistis kuraĝaj landaj ligoj kaj eĉ riskemaj eldonejoj. Ne malofte aperis grandkvantaj libroeldonoj kaj kelkfoje eĉ por la daŭro de kelkaj jardekoj. Dum la 2-a epoko (tuj post la Unua Mondmilito) la literaturo de Esperanto fariĝis egalvalora kompare al la nacilingva literaturo laŭ pensmanieroj, spirito, stilo kaj temoj.

### Germana Skolo

La fruaj pioniroj en Germanio kiel *Leopold Einstein*, *W.H. Trompeter*, *E.W. Mybs*, *P.G. Christaller* k.t.p. estas bone konataj. Sed la germana skolo havis pluajn grandajn nomojn: *Walter Lippmann*, *Paul Bennemann* (li verkis multajn versojn, ekz. li tradukis la dramon de *Ibsen* "Reaperontoj"), *August O. Bünemann*, *Friedrich Pflath* kaj aliaj. Cetere la fama *Eugen Wüster*, kvankam li ne estis poeto, estas rigardata kiel patro de la terminologio de Esperanto kaj de la nacilingvaj lingvistikaj norm(ig)oj ĝenerale. *Wüster* estis vere eksterordinara talento.

*HANKEL Marie* (1844 *Schwerin* - 1929 *Dresden*). Vidvino de universitata profesoro. Interalie ŝi tradukis la Esperantan himnon "La Espero" (*Die Hoffnung*) en la germanan, kaj multajn nacilingvajn tekstojn en Esperanton, eĉ komediojn. En 1909 ŝi gajnis en Barcelono, do fariĝis reĝino de la "Floraj Ludoj". "La renkonto" estas komedieto originale verkita de *M. Hankel*, ludita dum la 4-a Internacia Esperanto-Kongreso en Dresdeno. Ŝi dediĉis sian tutan vivon al Esperanto.

*JUNG Teo* (1892-1986). Germano, poste nederlanda civitano, ĵurnalisto. Li estis unu el la malmultaj homoj, kiuj kapablis vivi dum la tuta

vivo per Esperanto. *Jung* estis la fondinto kaj ĉefredaktoro de la sendependa gazeto "Esperanto Triumfonta" (aperadis en dusemajna ritmo ĝis la Dua Mondmilito), kiu nun nomiĝas "Heroldo de Esperanto". Liaj originalaj verkoj estis "La Alta Kanto de la Amo" (poemo laŭ motivo de malnova kelta legendo), "Lando de l' Fantazio" (aventura kaj fantasta romano).

*MINOR Karl* (\*1891 Londono - 1946). Anglo, loĝinta en Hamburgo kiel reklamisto kaj eldonisto. Li aktivis kiel literatura redaktoro kaj recenzisto de "Germana Esperantisto" kaj tradukis la plej faman verkon "Natan la saĝulo" de *G.E. Lessing*, dramecan poemon en kvin aktoj. Ĝi aperis en 1923 ĉe eldonejo *Ellersiek & Borel*. *Karl Minor* eldonigis ĉe la sama eldonejo "*Deutsche Redensarten in Esperanto*" kaj vortaroj. En 1921 li ankaŭ aperigis en Hamburgo la lingvomagazinon "La Gajulo".

*RENN Ludwig* (pseŭdonomo – vera nomo: *Arnold Friedrich Vieth von Goßbenau*, \*22.4.1889 en *Dresden*, mortis 20.7.1979 en Orient-Berlino). Fama germana romanverkisto, estis elektita kiel prezidanto de IAREV (mallongigo de Internacia Asocio de Revoluciaj Esperanto-Verkistoj) kaj verkis multon en Esperanto. La naziistoj malliberigis lin. En la iama Germana Demokratia Respubliko (GDR) li fariĝis fama libroaŭtoro.

*SCHRAMM Albert* (05.08.1880-25.10.1937) estis grava persono en Germanio, ekz. estro de la Germana Akademio por Bibliotekistoj, redaktoro de Internacia Stenografia gazeto, de la germanlingva magazino "*Rund um die Welt*", k.t.p. Li fondis la Saksan Esperanto-Instituton. *Schramm* aktivis kiel redaktoro de diversaj esperantlingvaj magazinoj "Ĉirkaŭ la Mondo", "Bela Mondo" kaj "Universo". Li ankaŭ eldonis diversajn propagandilojn kaj lernolibrojn.

*VANSELOW Karl* (1877-1959) verkis tre abunde originalaĵojn kaj tradukis prefere kantojn. Multaj poemoj aperis en "Heroldo de Esperanto" antaŭ kaj post la Dua Mondmilito.

En Germanio aktivadis tre aktivaj talentaj kiel *Heckners Verlag* en *Wolfenbüttel*, *Ellersiek & Borel*, *Ferdinand Hirt & Sohn* kaj poste eĉ la fama juda eldonejo *Mosse* en Berlino. Dum jardekoj ili eldonis aktive diversĝenrajn librojn, ne nur vortarojn kaj lernolibrojn.

### Hungara aŭ "Budapeŝta Skolo"

Sendube tiu ĉi Skolo estis la plej elstara de la Esperanto-movado dum la 2-a epoko. Nur eblas, citi kelkajn verkistojn kun gravaj verkoj:

**SCHWARTZ Tivadar** (1894-1968) (li estis la patro de la fama hungar-devena usonano kaj unu el la plej famaj borsistoj de la mondo, nome *George Soros*) eldonis inter la jaroj 1922 ĝis 1924 la beletran revuon "Literatura Mondo". Post la dua mondmilito li verkis i.a. "Maskerado ĉirkaŭ la morto"; temas pri la danĝera kaj mizera vivo de la judoj dum la Dua Mondmilito. *Vincenz Tóth* je nomo de Hungara Esperanta-Instituto transprenis la postan eldonadon de "Literatura Mondo". Ĉefredaktoroj estis *Baghy* kaj *Kalocsay*. En apenaŭ ok jaroj Literatura Mondo eldonis 80 volumojn, en kiuj troviĝis kelkaj elstaraj verkoj kaj debutis multaj junaj verkistoj el la tuta mondo. Kvaronjare eĉ aperis Lingvo-Libro.

**L. TÁRKONY** (antaŭ la Dua Mondmilito li nomiĝis *Ludwig Totsche* (1902 – 1978) ofte aperigis poemojn en Literatura Mondo. En 1934 aperis "Dekdu Poetoj". La libro *De paĝo al paĝo* (1932) enhavas kritikajn studojn pri diversaj esperantlingvaj verkistoj. *Karoly Bodó*, *Wilhelm Bleier* kaj nemalmultaj aliuloj pliriĉigis la originalan literaturon en Esperanto.

**EMBA** (pseŭdonomo de *Imre Baranyai* (1902-1961). Unu el la aparte aktivaj kaj sukcesaj poetoj en Hungario. Pri lia naskiĝloko li verkis jene:

En loko post la dors' de Dio,  
en grize drona malproksim'  
okazis eta tragedio  
patrino mia naskis min.

*Emba* verkis multon. Eĉ kiam en la jaro 1934 la Ministerio pri Internaj Aferoj malpermesis la Hungaran Esperanto-Ligo (HESL), li poeme reagis.

**SZATHMÁRI Sándor** (1887-1974). Hungaro. Inĝeniero. La originala ĉefverko estas la romano "Vojaĝo al Kazohinio", akra socia kritiko, senindulga, trafa, sed samtempe amuza satiro. Oni tradukis ĝin en

multajn lingvojn. Lia dua verko estas la romano "Maŝinmondo". "Kain kaj Abel" enhavas novelojn. Li ankaŭ tradukis kelkajn verkojn el Esperanto en etnolingvojn.

**BAGHY Julio** (13.01.1891 – 1967). Neniu el la Esperanto-verkistoj estis tiomgrade esperantisto, neniu el ili vivas tiom en la Esperanto-medio, kaj neniu sentas tiom da respondeco por la kultura progreso de nia movado kiom *Baghy*. Li fariĝis esperantisto en 1911, sed pro la milito kaj militkaptiteco li debutis nur en 1922 aŭ 1923 – sed jam per kompleta memstara verko "Preter la vivo". Normale, militkaptiteco postlasas negativajn spurojn, sed por poeto la amaraj spertoj estis pozitivaj kondiĉoj por krei eksterordinarajn verkojn. "Preter la vivo" jam estis matura kreaĵo. Kvankam li ne neglektis la tradician antaŭmilitan poezion, tamen li kreis ion tute novan: la freŝo, vervemo de lia voĉo signifas literaturan revolucion kun fortaj koloroj kompare kun la antaŭmilitaj anemijaj grizoj de la pli frua literaturo (Primitiva Romantismo). Certe *Julio Baghy* grave maturigis kaj "polur(ig)is" nian literaturon. Ekz. ni ja konas la eksmodajn stereotipajn rimojn: amor', dolor', kor', plor' ktp., kiuj oftis dum la epoko de la "primitiva romantismo".

**KALOCSAY Kálmán** (1891-27.02.1976). La alia Esperanto-koloso el Hungario estis *Kolomano Kalocsay*. Laŭ profesio li deĵoris kiel profesoro por medicino kaj kiel ĉefkuracisto. Li konis multajn okcident-kaj orienteŭropajn lingvojn, same la literaturojn. *Kalocsay* unue debutis kiel hungarlingva poeto en 1921. Li estis aktivulo de la movado, ofte deklamis poemojn, aktorin kaj estis same kiel *Baghy* bonega oratoro. Dum la UK 1922 en *Helsinki* li deklamis sian "Kongresan Runon" je formo de la Kalevala. *Kalocsay* havis grandegan energipotencialon. Liaj originalaj poemoj aperis en la kajereto "Mondo kaj Koro" en la jaro 1921. Poste ili aperis en "Streĉita Kordo" (1931) kaj "Rimportretoj" (1931). 1939 aperis malgranda poemvolumo "Izolo".

"Sekretaj sonetoj" aperis sub lia pseŭdonimo *Peter Peneter*. La "Sonetoj" konsistas el 52 perfektaj sonetoj pri evoluigantaj amsentoj kaj amludoj de juna paro. Por la intimaj vortoj *Kalocsay* uzis multajn neologismojn. Li ankaŭ tradukis multajn verkojn, ekz. en 1923 "Johano la Brava" de *Petőfi*. Elstare fidela kaj majstra traduko "Tragedio de l' Homo" de *Madaĉh* aperis en 1924. "Hungaran Antologion" li redaktis en la jaro 1933. Danke al la poligloteco li tradukis el 22 ling-

voj kaj la poem-antologio en 1931 nomiĝis "Eterna Bukedo". En 1938 aperis "Romaj Elegioj" kaj "Taglibro" de *Goethe*. "Infero" de *Dante* (1933) estis same majstroverko pro genia kaj formfidela tradukarto. "Parnasa Gvidlibro" en 1932 kaj la "Plena Gramatiko de Esperanto" en 1935 nia geniulo verkis kune kun sia franca amiko kaj elstara talento *Gaston Waringhien*. Ankaŭ dum la 3-a epoko (periodo) *Kalocsay* tre aktivis.

### Iom el Nord-Eŭropo

**BONNEVIE Honoratus** (1858-1906). Li estis filologo pri la lingvoj pranorvega, greka kaj latina. Li helpis redakti la organon de Norvega Esperanto-Ligo (NEL) kaj aktivis kiel kunlaboranto de "La Espero". Li verkis gramatikojn kaj vortarojn por norvegoj.

**ENGHOLM Stellan** (1899-1960). Sveda instruisto. Ekde 1927 ĝis la morto ege aktiva por Esperanto sur multaj kampoj. Sobra humanismo kaj idealismo markas lian tutan verkaron. Li eldonis "Malgranda Revuo", kiu estis tre informriĉa. Li tradukis ekz. "Per balono al la poluso" (pri esploristo *André*, 1930), "La mono de sinjoro Arne" (de *Lagerlöf*, 1933), "*Gösta Berling*" (de *Lagerlöf*, 1934), "Pasko" (de *Strindberg*, 1935), "La ringo de la generalo" (de *Lagerlöf*, 1938). Originalaj verkoj el la plumo de *Stellan Engholm* estas ekz. "Al Torento" (romano 1930, 1934), "Homoj sur la Tero" (premiita romano en roman-konkurso de Literatura Mondo, 1931, 1963), "Infanoj en Torento" (romano, vol. 1: 1934, 1946, 1972, vol. 2: 1939, 1972), "Maljunulo migras" kaj "Venĝo" (noveloj, 1943), kaj "Vivo vokas" (romano, 1946).

**HALL Agatha Frederika Hilma** (1854-1922). Ŝi laboris kiel instruistino kaj bibliotekistino. En 1919 ŝi tradukis de *Kivi* "La botistoj" kaj en 1920 "La fianĉiĝo".

**NYLÉN Paul Axel** (1870-1958). Laŭ profesio redaktoro ĉe la fama "*Stockholm-Tidningen*". Li aktivis dum ĉiuj tri esperantlitteraturaj periodoj. Krom vortaroj, lernolibroj, lingvistikaj verkoj li ankaŭ kreis poezion kaj tradukis i.a. la naturalistan tragedion de *A. Strindberg* "Fraŭlino Julie".

**RAMSTEDT Gustav John** (1873-1950) laboris kiel profesoro pri altaj lingvistiko. Dum jardekoj li estis aktiva sur multaj kampoj por Esperanto. Li verkis poemojn kaj faris multajn tradukojn, prefere de famaj finnaj verkistoj.

**SKEEL-GIÖRLING Frederik** (1876-1910) verkis ampleksajn lernolibrojn kaj vortarojn por danoj kaj tradukis fabelojn de *H.C. Andersen*, kaj de *R. W. Trine* "En harmonio kun la eterneco".

**SZILÁGYI Ferenc** (1895-1967). Hungaro. Meze de la tridekaj jaroj li fariĝis sveda civitano. Li estis doktoro de juro kaj laboris kiel redaktisto k.t.p. Liaj originalaj verkoj "Trans la Fabel-oceano" (modernaj fabeloj), "La Granda Aventuro", "Inter Sudo kaj Nordo", "Koko krias jam" (majstronoveloj), "Mistero Minora" (psikologia kriminala romano), "Sveda Novelaro" kaj "Rapsodioj" (kolekto el prozo kaj poezio). Li tradukis multon kaj aktive kunlaboris dum jardekoj kun "Literatura Mondo" en Budapeŝto. Danke al Literatura Mondo kaj aliaj kulturaj gazetoj ja ekzistadis konstante staĝo por debutadoj de novaj verkistoj kaj aliaj talentoj.

### Nederlando kaj Belgio

**BULTHUIS Hindrik Jan** (\*1865 en *Warfum* ĉe *Groningen* - 1945) estis unu el la plej fekundaj Esperanto-verkistoj-prozistoj. La stilo-lingvaĵo de *Bulthuis* estas simpla, klasika, senornama. Li estas pli verŝajne pli bona teksisto de rakontoj ol konscia evoluiganto de la literaturo en Esperanto. *Bulthuis* postlasis riĉan verkaron en Esperanto, ekz. diversajn lernolibrojn, *Krestomation*. Kelkaj romanoj de li estas "Idoj de Orfeo", "Jozef kaj la edzino de Potifar", "La Vila Mano" kaj "La du ŝipoj" (poemoj, 1909). Same li tradukis multon, ekz. "Robinsono Kruso".

**DORNO F.V.** aŭ **DORVAL Deck** (= pseŭdonomoj de *Frans van Dooren* (1905 - 1996). Kelkaj ĉefaj verkoj: "La aventuroj de Lia Reĝa Moŝto Stultulof la X-a de Fugio" (prozo, 1936), "Kia miksaĵo!" (farso, 1938), "Levu la manojn!" (komedio, 1939) kaj aliaj verkoj dum la Tria Epoko.

## Franca Skolo

**LANTI Eugen** (pseŭdonomo de *E.Adam*, 1879-1947). Normando, instruisto. Aŭtoro de originalaj verkoj, ofte tre politikaj kiel "For la Neŭtralismon", "La Laborista Esperantismo", "Naciismo", "Leteroj de Lanti", "Vortoj de Kamarado Lanti". Li fondis Sennaciecan Asocion Tutmondan (SAT) kaj redaktis la klasbatalan revuon "Sennaciulo". *Lanti* tradukis i.a. "Skizo pri filozofio de l'homa digno" de *Cilles*, "Kandid" de *Voltaire*.

**PRIVAT Edmond** (1889 - 1962). Franca sviso, universitata profesoro de angla literaturo ĉe la universitato en Ĝenevo. Ege aktiva kaj talenta homo por Esperanto dum jardekoj. Ekde 1920 - 1934 li estis ĉefredaktoro de la "Revuo Esperanto". Inter aliaj li verkis: "Ginevra" (versa dramo-legendo laŭ la antikva kelta legendo), "Tra l' silento" (poemaro), aŭtoro de diversaj libroj kiel "Vivo de Zamenhof", "Vivo de Gandhi".

**SCHWARTZ Raymond** (1894-1973). Franco, bankdirektoro. Poeto kaj humoristo en la esperantista mondo. Pri li mi raportos en speciala prelego pri la 3-a Epoko de Esperanta-Literaturo, ĉar, kvankam li komencis dum la 2-a epoko, li ĉefe agadis dum la Tria Epoko tuj post la Dua Mondmilito. Verkoj: "Verdkata testamento" (originalaj versaĵoj, 1926, 2-a eld. 1930), "Prozo ridetanta" (noveloj, 1928), "Anni kaj Montmartre" (romano, 1930), "La stranga butikoj" (originalaj versaĵoj, 1931).

**WARINGHIEN Gaston** (pseŭdonomoj: *G.E.Maura*; *A.Nurak* kaj *A.Papadiamantopoulos*, 1901 - 20.12.1991). Franco; agregacia profesoro, vortaristo, Akademiano. Li estis kunredaktoro de "Literatura Mondo", ĉefredaktoro de "La nica literatura revuo". Lia vortarista laboro kulminis en "Plena Vortaro" (1930 kaj postaj eldonoj). Aliaj gravaj verkoj (ekz. kun *Kalocsay*) en 1935 estis "Plena gramatiko de Esperanto". Li redaktis "Facilaj esperantaj legaĵoj" en 1935. En la sama jaro aperis lia traduko "Maksimoj" de *La Rochefoucauld*. Dum la 3-a epoko li same ege aktivadis.

## Iberia Duoninsulo kaj Italio

**INGLADA-ORS Vicente** (1879-1949). Li estis aktiva kunlaboranto de multaj Esperanto-gazetoj. Li tradukis multon kaj kreis diversajn lernolibrojn kaj vortarojn. Sed ankaŭ "Prozaĵoj kaj versoj" (kolekto de rakontoj, legendoj, versaĵoj), ktp. li eldonigis.

Aliaj aktivaj poetoj en Hispanio estis *Antonio Lopez Villanueva*, *José Garzon-Ruiz*. En Katalunio aktivis *Alfonso Sabadell*, *Frederic Pujulà-i-vallés* kaj multaj aliaj. *Luzo Bemaldo* estis aktiva verkisto en Portugalio.

**PIZZI Francesco** (1880-1946). Italo. Bibliotekisto. Redaktoro de "Katolika Sento". Verkoj: "En la mondon venis nova sento" (poemoj, 1925); "La floretoj de Sankta Francisko" (traduko, 1926); "La protektanto" (originala poemo, 1932).

## Brita Skolo

**Bicknell Clarence** (1842-1918). Li estis poeto, kies poemoj estis ŝatataj kontribuadoj de "La Revuo" kaj *The British Esperantist*. Li gajnis premion ĉe la Floraj Ludoj dum la Barcelona Kongreso en 1909. Cetere ĝis en nia nuna tempo la tradicia kulturaranĝo de Barcelonaj "Floraj Ludoj" ekzistas - unu el la malmultaj regulaj kulturaranĝoj de nia Movado, kie ankaŭ novaj poettalentoj povas debuti kaj gajni premiojn.

**LUYKEN Heinrich August** (\*1864 *Allenkirchen*, Germanio - 1940). Germano, translokiĝis al Anglio. Originalaj romanoj estas "Paŭlo Debenham", "Mirinda amo" kaj "Stranga heredaĵo". "Pro Iŝtar" same estas originala romano, kiu fontas sur la bazo de antikvaabela historio.

*Richard Henry Geoghegan*, *Joseph Rhodes*, *Al. John Ellis*, *James Charles O'Connor*, *Eliza Ann Lawrence*, *Harold Mudie Bolingbroke*, *George J. Cox*, *Louisa Schaffer* (tradukis ankaŭ famkonatajn britajn kantojn), *Achille Motteau*, *Alfred Edward Wackrill*, *Herbert F. Höveler* (pseŭdonomo *E. Ĉefeĉ*), *Bernard Long*, *A.J. Edmonds*, *William Maine Page*, *William Morrison*, *Ellis Ethelmer*, *H.B. Hyams* (filozofia romano "Nova Sento") kaj ne malmultaj aliaj formas longan liston de aktivaj aŭtoroj el Britio.

### Orient-Eŭropo

**ADAMSON Hendrik** (1891-1946). Estono, instruisto. Li ankaŭ verkis multe en la estona lingvo. Lia ĉefverko de daŭra valoro restas la originala romano "Aŭli". Temas pri vivo de malgranda knabo. "Vesperkanto" estas poemaro el propraj originalaj kreaĵoj. Nemalmultaj el liaj poemoj aperis en "Literatura Mondo" kaj en la kolekto "Dek-du Poetoj" (antologio de dek-du esperantistaj poetoj).

**DRESEN Hilda** (1896-1981). Aktiva kunlaborantino ĉe "Literatura Mondo", "La Nica Literatura Revuo", "Norda Prismo" kaj multaj aliaj esperantlingvaj periodaĵoj. Originalaj poemoj aperis i.a. en "Dek-du poetoj" (1934), "Horizontoj" (poemoj, 1931) kaj en verkoj dum la Tria Periodo kiel "Estonaj Kantoj", "Estona Antologio", "Estona Soveta Poezio". Elstara estas ŝia traduko "Kalevipoeg".

**EROŜENKO Vasilij** (1890-1952). Ruso, blindulo, elstara kursgvidanto kaj poeto. Malgraŭ sia blindeco li travojaĝis grandan parton de la mondo, ĉefe Ĉinion kaj Japanion, prelegis pri rusa literaturo en la universitato de Pekino. Li aŭtoris la jenajn originalajn verkojn: "Ĝemo de unu soleca animo", "Unu paĝo el mia lerneja vivo", "Turo por falo", "Malvasta kaĝo" (ĉio noveloj). Li uzis bonan sed sentimentalen stilon. Eroŝenko apartenas al tri literaturoj: Esperanta, rusa kaj japana. "La Tundro ĝemas" (originalaj japanaj fabeloj) kaj la faman poemon "Ciganino" ni ankaŭ dankas al *Vasilij Eroŝenko*.

**FORGE Jean** (1903-1980), pseŭdonomo de *Jan Fethke*. Pola kaj berlina filmreĝisoro. Li kapablis per amuzliteraturo kapti la atenton de la legantoj. La verkojn "Abismoj" (romano, 1923), "Saltego trans jarmiloj" (romano, 1924), "Mr. Tot aĉetis mil okulojn" (romano) li verkis en la jaro 1931. Oni povas trovi surbaze de tiu ĉi romano filmon en la germana: "Die 1000 Augen des Dr. Marbuse". Li ankaŭ reĝisoris Esperantan filmon "Morgaŭ komenciĝos la vivo".

**HOHLOV Nikolao** (1891-1953). Ruso. Ekonomo ĉe industria trusto. "La Tajdo" estas unika poemaro pro la sorĉa liriko kaj muzika lingvo de la versoj. La verko staras ĉe la pinto de Esperantaj poemaroj. Li tradukis multon.

**KRESTANOV Ivan** (1890-1966). Bulgaro. Lektoro. Li elektis kaj tradukis verkojn de bulgaraj aŭtoroj por Bulgara Antologio. Liaj originalaj verkoj estas "Rememoroj de Esperantisto", "La lingva esenco de Esperanto", "El la Proksima Oriento".

**LEJZEROWICZ Izrael** (1901-1942)

Hebreo en Pollando, ĵurnalisto, komercisto. Kiel viktimo de la faŝistoj li mortis en Pollando. Li estis tre aktiva en la movado. Nemalmultajn verkojn li tradukis el la hebrea kaj jida lingvoj. Lia ĉefa verko el la jaro 1935 estas tipe Esperanta satiro "El la Verda Biblio". Oni ne malofte uzas citaĵojn el ĝi.

**MIHALSKI Eugen** (1897-1937). Ruso. Bibliotekisto. Oni festas lin kiel grandan talenton kun ardo kaj impeto. Jen kelkaj originalaj verkoj: "La unua ondo", "Prologo", "Kantoj de l'amo kaj sopiro", "Du poemoj", "Fajro kuracas". La lasta titolo alvokas al klasbatalo.

**NEKRASOV Nikolaj** (1902 - ?). Ruso. Ĵurnalisto. Speciale li okupas sin pri la literaturo de Espranto el sociologiaj vidpunktoj. Krom tradukoj de famaj rusaj verkistoj li originale verkis poemaron "Krono de sonetoj" kaj vojaĝpriskribon "Tra USSR per Esperanto".

**ŜIDLOVSKAJA Maria** (18?? - ?). Rusino, sanitaristino. De ŝi ekzistas pli ol 100 tradukoj en bonega stilo. Nur malmultajn mi citu: "Princo Sebrjanij" de *I.N. Tolstoj*, "La kapitanfilino" de *A. Puŝkin*, "La sonĝo de Makaro" kaj "La senlingvulo" de *V. Korolenko*.

**VARANKIN Vladimir** (1901-03.10.1938 per mortpafigo fare de militista kolegio de la Supera Kortumo de USSR). Ruso, historiisto. Li eterniĝis per sia lingvistika verko "Teorio de Esperanto" kaj per la fama originalromano "Metropoliteno". Ĝi montras grandan verkistan talenton kaj bonegan stilon.

**ZAMENHOF Felix** (1868-1933). Frato de *L.L. Zamenhof*, kaj unu el la unuaj de la Zamenhofa familio, kiu eklernis Esperanton. Multon li helpis al sia frato, aperigis multajn poemojn. Kelkaj aperis en "Fundamenta Krestomatia". La ĉefa verko lia estas "Verkaro de FeZ" (kolektitaj verkoj, 1935).

**ZAMENHOF Lidja** (1904-1943). Filino de la aŭtoro de Esperanto. *Cseh*-instruistino. Krom etaj originalaj verkoj ŝi ĉefe tradukis ekz. librojn pri bahaismo, la klasikan romanon de *H. Sienkiewicz* "*Quo vadis?*", "*Iridionon*" kaj "*Novelojn*" de *B. Krasinski* kaj aliajn naci-lingvajn verkojn Lidja tradukis en Esperanton.

### Iom pri literaturistoj el aliaj kontinentoj

Ekzemple en Meksiko verkis *Ambrosio Vargas*. En Ĉilio tradukis kaj originale kreis *Luis Enrique Sepulveda Cuadra*. *Coutinho* kaj *Backheuser* verkis aktive en Brazilo.

En Usono vivis la aŭtoroj i.a. *Henry Phillips*, *Arthur Brooks Baker*, *John Josef Süßmuth*, *Lehmann Wendell*, *Ivy Kellermann*. Aŭstralio havis ekz. *Arthur Maurice Hyde* kaj Nov-Zelando *George Gordon*. En Afriko ankoraŭ ne estis movado, preskaŭ sen verkistoj aŭ tradukistoj. En Hindio aktivis la angla kolonelo *John Pollen*.

La usonano *Saxton Payson* (1842-1932) estis laŭ profesio operkantisto. Li tradukis i.a. "La Akrobato de nia Sinjorino", "La Palaco de Danĝero" (historia romano), "La Rozujo Ĉiumiljara" kaj "Miserere", ĉio de *M. Wagnalls*, "*Thais*" de *A. France*, "Luno de Izrael" kaj "Ŝi", ambaŭ de *R. Haggard*, ktp. *Saxton Payson* ankaŭ estis la aŭtoro de originala poemaro "Juneco kaj Amo".

*Asaĵiro Oka*, *Osugi Ei*, *Hasegawa Tacunosuke*, *Toŝio Ĉif*, *Kunitaro Takahaŝi*, *Kenĵi Ossaka* lumis i.a. sur la kampo de Esperanto-literaturo en la t.n. "malproksima oriento" (Japanio).

*Saint-Jules Zee* el Ĉinio estis aktiva kunlaboranta aŭtoro dum la Dua Epoko. Poemoj en "Naŭ poetoj" aperis en 1973. Pluajn librojn li verkis dum la Tria Epoko.

### Kromaj informoj kaj rekomendoj

Mi pardonpetas, ke en eta eseo ne eblas pritrakti la temon pli amplekse. Kelkfoje oni povas mencii nur ekzemplojn por baze informi pri la esplorinda temo kaj por vekti apetiton je plua legado laŭ propraj alirmetodoj, ekzemple laŭ landoj aŭ prefere laŭ renomaj verkistoj.

Ĉar la uzantoj de Esperanto nur vivas en diasporo kaj kutime nur relative malofte havas praktikajn eblecojn uzi Esperanton, la Esperanta "popoeto" ĝenerale tre ŝatas la literaturon kaj fieras pri ĝi.

Tamen la plej granda parto de la uzantoj de nia lingvo nur havas tre bazajn sciojn pri la vasta gamo de la Esperanta literaturo. La esprimkapablo de Esperanto estas grandega, kvankam ĝi estas ankoraŭ relative juna, respektive nova, lingvo. La potencialoj entute estas grandiozaj. La plej grandaj kolektoj troviĝis ĉe Esperanto-Asocio de Britio. Viziteblas la rimarkinde granda kolekto ĉe la Internacia Esperanto Muzeo en Vieno. La Germana Esperanto-Biblioteko troviĝas ĉe la urba biblioteko de la sudgermana urbo *Aalen*. Sed ekzemple ankaŭ en aliaj germanaj regionoj ekzistas librokolektoj, ofte ĉe kluboj aŭ privatuloj. En la jaro 1980 *Marinko Ĝivoje* el Zagrebo eldonis "*Konsultlibron pri Esperantaj bibliotekoj kaj muzeoj*". En dekoj da landoj troviĝas bibliotekoj pri esperantologio kaj interlingvistiko. Relative malofte ĉe universitatoj troviĝas etaj faksekcioj pri Esperanto kaj aliaj planlingvoj.

Post la politika ŝanĝiĝo (ĉ. 1990) en Eŭropo la eldonado kaj la relative grandaj eldonkvantoj de esperantlingvaj produktoj iom stagnadis. Intertempe denove aperas jare inter po 200 - 300 binditaj verkoj en Esperanto. Sufiĉe riĉas ankaŭ la eldonado de gazetoj. Kelkajn vortojn mi jam mencii en mia eseo pri la Unua Epoko de Esperanto-literaturo. Ne ekzistas precizaj informoj pri la nombro de la broŝuraj aŭ libroforme eldonitaj verkoj entute, eble inter 30 000 ĝis 50 000 verkaĵoj en binditaj formoj. Krome ekzistas multaj eblecoj por komputiloj kaj "libroj", kaj danke al la "reto" ĉio haveblas senkomplike - eĉ mondvaste - sur ekranoj. Oni simple devas plonĝi en la riĉan literaturon de la diversaj epokoj por spertadi la diversajn enhavojn, ĝenrojn kaj stilojn.

### Fontindikoj / Bibliografio / Fakliteraturo

*AULD William* : Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto. *Artur E. Iltis*, Saarbrücken, 1979

*AULD William* : Esperanta Antologio. STAFETO. La Laguna sur Tenerifo, 1959

*AULD William* : Kulturo kaj Internacia Lingvo. Fonto. *Chapeco*, Brazilo, 1986

*AULD William* : La Fenomeno Esperanto. UEA, Rotterdam, 1988

*BAGHY Julio* : Sonĝe sub pomarbo. Triakta lirika romano en ses fantaziaj bildoj (kun antaŭparolo de Marjorie Boulton). Eld. J. Regulo, La Laguna, Kanariaj Insuloj, 1958

*BEIN Kazimierz* : Literatura Antologio. PEA, Varsovio, represo 1977

*BENCZIK VILMOS* : Libro de romanoj (La aŭtoro rerakontas la ses romanojn de la unuaj grandaj romanistoj de Esperanto, nome *H.S. Luyken* (1864-1940) kaj *H. Valienne* (1854-1908).

Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, 1979

- BENCZIK Vilmos : Baza Literatura Krestomatio. HEA, Budapeŝto, 3-a eldono, 1986  
 BENCZIK Vilmos : Studoj pri la Esperanta Literaturo. La Kritikanto, Kameoka / Japanio, 1980  
 Die Literatur, Schüler-Duden, Dudenverlag, Mannheim, 2. Ausg., 1989  
 Germana Antologio (diversaj tradukistoj) : Bleicher-Verlag, Gerlingen, 1987  
 HANKAMER Paul : Deutsche Literaturgeschichte. Verlag der Buchgemeinde, Bonn am Rhein, 1930  
 KABE : Unua legolibro. Varsovio, Ritmo, represo 1985  
 KALOCZAY Kálmán, WARINGHIEN Gaston, BERNARD Roger : Pamasa Gvidlibro. PEA kaj Heroldo, 2-a eld., 1968  
 LAPENNA Ivo : La Internacia Lingvo - Faktoj pri Esperanto. UEA, Centro de Esploro kaj Dokumentado, Herongate, Rickmansworth, Anglio, 1934  
 LECHNER Hermann : Lechner's Literaturgeschichte des Deutschen Sprachraumes, Vom Mittelalter bis zur Mitte des 20. Jahrhunderts, Lechner Verlag, Limassol, Cypern, 1995  
 Lexikon deutschsprachiger Schriftsteller : (diversaj aŭtoroj), VEB Bibliographisches Institut, Leipzig, 2. Ausg., 1989  
 METZLER J.B. kaj aliaj aŭtoroj : Deutsche Literaturgeschichte von den Anfängen bis zur Gegenwart, J.B. Metzlersche Verlagsbuchhandlung, Stuttgart, 1979  
 OESTE Wilhelm Theodor : Esperanto - Mittler der Weltliteratur, S. Ziegler-Verlag, München, 1952  
 PECHAN Alfonso : Gvidlibro por supera ekzameno, HEA, Budapeŝto, 1979  
 STOJAN Petr E. : Bibliografio de Internacia Lingvo, UEA Genevo, 1929. (Represo: Georg Olms Verlag, Hildesheim)  
 SZERDAHELYI István : Krestomatio de Esperanto Literaturo. Tekstoj, dataro, bibliografio. Eld. Eötvös Loránd Tudományegyetem (Universitato), Budapest: Vol. I (1979), Vol. II (1981), Vol. III (1982)  
 ŜIRJAEV I., BLEIER V., KÖKÉNY L. : Enciklopedio de Esperanto, HEA, Budapeŝto, represo de la 1-a eldono, 1979  
 VALANO Johano : La Bona Lingvo. UEA Rotterdam,  
 WARINGHIEN Gaston : Beletro, sed ne el katedro. Serio Stafeto, n-ro 4, Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno, 2-a eld., 1987  
 WARINGHIEN Gaston : Kaj la ceter' - nur literaturo. Esperantologiaj Eseoĵ V. Stafeto, Antverpeno - La Laguna, 1983  
 ZAMENHOF L.L. : Fundamenta Krestomatio. UEA, Rickmansworth, 17-a eld., 1954  
 ZAMENHOF, L.L. : Originala Verkaro. Kolektita kaj ordigita de d-ro Joh. Dietterle, Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig. Esperanto-Fako, 1929

## Adreso de la aŭtoro

Peter ZILVAR

p.a. Esperanto-Gesellschaft Südhar (www.Esperanto-Zentrum.de)

Grubenhagensstrasse 8

DE - 37412 Herzberg am Harz

GERMANIO

<zilvar@t-online.de>

## Priaŭtoro informo

La aŭtoro, kiu nuntempe organizas je komision de Germana Esperanto-Asocio (GEA) la studsesiojn por klerigo kaj profesiiĝo en Herzberg/Harz, Germanujo, kompilis la suprajn informojn i.a. dum studado de interlingvistiko (1998-2002) ĉe Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznań, Pollando, kaj el fakaj prelegoj de Lidia Ligęza, István Ertl, Humphrey Tonkin kaj Geraldo Mattos.

## La duobla ludo de Salomono\*

Reinhard FÖSSMEIER

### Resumo

Ludoteoria analizo de la biblia "juĝo de Salomono" rezultigis, ke ne ekzistas ludo, kiu decidus la juĝ-problemon (trovas la veran patrinon de infano) kaj samtempe efektivas la juĝon (donas la infanon al la vera patrino). Sed kun la hipotezo, ke Salomono por tio uzis duoblan ludon, la problemoj estas facile solveblaj. La biblia raporto subtenas tiun hipotezon.

### Riassunto: Il gioco doppio di Salomone

Di un'analisi della storia biblica del "giudizio di Salomone", mediante la teoria dei giochi, è risultato che non esista un gioco che decida la domanda del giudizio (trovi la madre vera di un bambino) e allo stesso tempo esegua il giudizio (restituisca il bambino alla sua madre vera). Ma con l'ipotesi che Salomone abbia giocato un gioco doppio il problema risulta solubile. Il rapporto biblico sopporta quest'ipotesi.

### Zusammenfassung: Salomos doppeltes Spiel

Eine spieltheoretische Analyse der biblischen Geschichte von "Salomos Urteil" hat ergeben, dass kein Spiel existiert, das die Frage des Urteils entscheidet (also die wahre Mutter eines Kindes herausfindet) und gleichzeitig das Urteil ausführt (das Kind seiner Mutter zurückgibt). Unter der Voraussetzung, dass Salomo ein doppeltes Spiel gespielt hat, wird das Problem jedoch leicht lösbar. Der biblische Bericht unterstützt diese Hypothese.

### 1. Enkonduko

Artikolo de Marco Li Calzi (2002) pri ludoterio finiĝas per analizo de la juĝo de Salomono, prezentita en la Biblio (I Reĝoj 3, 16-27). Salomono decidus la demandon, kiu el du virinoj estas la vera patrino de infaneto, per la propono, dividi la infanon per glavo; la virinoj, kiu post tio preferas tute rezigni, li difinas kiel la veran patrinon.

\* surbaze de la notoj de ludoteoria kurso dum SUS 26 de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino en Rimini/Sanmarino, 2003-09-01/04